

JUNIO 2009

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2009:3

Sveda Esperanto-Kongreso

## Intensaj tagoj en Borlänge



Maldekstre: 1. Vigla folkloro muziko. Fotis: Ann-Louise Åkerlund.

2. La jarkunvenaj prezidanto Agneta Emanuelsson kaj sekretario Ann-Louise Åkerlund legas la agadraporton. Dekstre la prezidanto Bengt Åradsson. Fotis: Kaisa Hansen.

Dekstre: 1. Konstantin Areev prelegas post dumonata studado de Esperanto. Fotis: ALÅ.

2. Dum la diskutvespero. Fotis ALÅ

3. Bona manĝo por ĉiuj gustoj. Fotis: KH.





## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Junio 2009 • 97-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: esperanto@globalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2009: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2009:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tillägsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 0705-850054.

## ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11

961 76 Boden, tel. 0921-123 54

e-post: esperanto@globalnet.net

*Stoppdatum Utkommer senast*

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5 30 september 31 oktober

Nr 6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktionen i god tid innan.



## NI PREZENTAS

### Martin Kjellin



*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Götene, Västergötland, en 1979.

*Kie vi loĝas?*

Mi loĝas en Upsalo.

*Pri kio vi laboras?*

Mi estas universitata studento kaj studas lingvistikon.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Ĉiuj de miaj ĉefaj interesoj iamaniere temas pri plibonigado de la socio. Ekzemple mi estas aktiva membro de la verda partio kaj de la abstineca organizo IOGT-NTO. Aliaj interesoj de mi estas lingvoj kaj kulturo en diversaj formoj.

## REDAKcie

### Dankon por multaj bildoj!

Redaktante tiun ĉi numeron de La Espero lastminute mi dissendis peton pri bildoj al kelkaj esperantistoj. Mi ricevis inunton da bildoj. Dankegon!

Tial mi publikigos ankoraŭ unu.

Maldekstre oni dankas la lokan kongresan komitatton. Fotis: Kaisa Hansen.

Kvankam vi verŝajne ne povos vidi la vizaĝojn de la homoj, kiuj aranĝis la sukcesan kongreson en Borlänge, vi vidas ke multaj homoj helpis.

Kiam multaj homoj helpas pri aranĝo, estas pli da ĝojo fari la

*Ĉu vi havas familion?*

Mi loĝas sola, sed mi havas gepatrojn kaj du gefratojn.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

Jam kiam mi estis gimnaziano mi legis Esperantan lernolibron, sed ne vere lernis la lingvon. Post kelkaj jaroj mi ree ekstudis Esperanton kune kun tri amikoj. Ni ĉefe legis kaj ne multe parolis Esperanton, do mi komprenis la lingvon sed ne vere povis uzi ĝin. Antaŭ du jaroj mi partoprenis en mia unua Esperantorenkontiĝo (fakte en mia propra hejmo) kaj post tio mi pli multe parolas Esperanton.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Ĉi-jare mi iĝis kasisto de la Esperanto-societo de Upsalo. Bedaŭrinde la societo dum kelkaj jaroj ne multe aktiviĝis, sed nun Carl Mäsak, Johan Krig Ölund kaj mi provas aktivigi ĝin kaj tial ĵus ekis Esperantan studgrupon kun sep komencantoj.

*Kiu estas via preferata libro en Esperanto?*

Fakte mi ne multe legis Esperante, sed mi kompreneble memoras mian unuan Esperantan libron: Pipi strumpolonga de Astrid Lindgren.

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

laboron. Ju pli ni estas kune, des pli da simpatio. Ĉu vi rekonas la kanton?

Esperanto per si mem temas pri kontakton inter homoj.

Tial mi deziras al vi ĉiuj bonan someron. Renkontu homojn kaj ripozu!

Leif Nordenstorm

Via redaktoro



## Intensaj tagoj en Borlänge

*La Sveda Esperanto-kongreso estas kunlaboro inter pluraj esperanto-organizaĵoj en Svedio. La kongreso okazis 22-24-an de majo 2009 en popola altlernejo de Fornby en Borlänge, Dalekarlajo.*

Ĉirkaŭ 60 personoj ĉeestis kaj okazis dum tiuj tagoj samloke ankaŭ kunvenojn de diversaj svedaj esperanto-organizaĵoj.

SEF, Sveda Esperanto-Federacio, havis sian jarkunvenon. La estraro proponis altigon de la membrokoto. Post vigla diskutado ĝi tamen reprenis la proponon. Anstataŭ tio oni petos al la membroj donadi monon kiam estas apartaj aranĝoj. Kelkaj partoprenantoj opiniis ke tio estas bona penso. Tamen estas necese ke la membroj ricevu multe da informoj pri la planataj aranĝoj por ke ili estu pretaj donaci monon al ili.


SEJU, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, havis sian Anemonan renkontigon

Ankaŭ Eldona Societo Esperanto, Sveda sekcio de KELI kaj Esperanto-Gården jarkunvenis.

ILEI-se, Sveda sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, havis ne jarkunvenon sed membrokunvenon. SEI, Sveda Esperanto-Instituto (SEI), havis sian jarkunvenon kaj aranĝis plankunvenon kun gruplaboroj.

Inter tre interesaj programeroj estis prelegoj:

\* Projekto Lingvolanĉilo (angle Springboard to Languages) de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Tiu prelego estas vere imitinda kaj ripetinda multloke en aliaj landoj!



Paŭlo Gubbins. Fotis: Ulla Luin.

\* Ĝardena fervojkonstrua projekto de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Amuza prezento pri ĝi, kun multaj bonaj fotoj, kelkaj surprizaj. Vidu pli ĉe Youtube: *Garden Railway - Roundhouse Lady Anne first run SM32 16mm.*

\* Lingvolernado en la interreto de sinjoro Konstantin Andreev el Rusio kaj Svedio. Prelego impona de rusio kiu loĝas de antaŭ unu kaj duona jaroj en Svedio kaj antaŭ nur du monatoj kaj dek tagoj komencis lerni esperanton. Ĉiujn aŭskultantojn imponis lia flue bona lingvonivelo. La temo de la prelego estis grava; ĝi temis pri lingvolernado per interreto, en kiu altlernejo (universitateto) de Faluno estas elstare sukcesa kaj havas studantojn en diversaj kontinentoj kaj eĉ atingis organizi por svedoj kurson pri la kopta (praegipta) lingvo. La evidentaj demandoj estis, kiel oni povas tian sukceson realigi ankaŭ por esperanto, kaj kiel eblas kupli tion al nia kara lernu.net.

Aliaj programeroj estis:

\* Librotablo – prizorgis Karin kaj Thomas Tulkiewicz

\* Kurso por komencantoj – prizorgis Roland Lindblom

\* Distraĵo, komuna kantado, komuna dancado, folkloro muziko – prizorgis Mhedi Martin Strid

La impresoj estis ke la partoprenantoj kontentis pri la kongreso kaj ŝatis ian etoson.

**Kaisa Hansen**

### Elektitaj en Borlänge

**La estraro de Sveda Esperanto-Federacio**

Bengt Olof Åradsson, prezidanto, ekonomio;  
Bengt Nordlöf, vicprezidanto  
Ann-Louise Åkerlund; sekretario, ekonomio;  
Wim Posthuma, estrarano;  
Olof Pettersson, estrarano;  
kunredaktoro de La Espero; la lingva tago;  
Roland Lindblom, anstataŭanto;  
Dan Palm, anstataŭanto

**Taskoj ekster la estraro de SEF**

Anita Dagmarsdotter, kontumado;  
Kaisa Hansen, membroregistro,  
kunordiganto, ĝemelaj urboj  
Leif Nordenstorm, redaktoro de La Espero

**La estraro de Esperanto-Gastejo**

Martin Strid  
Lennart Svensson  
Anders Rylander  
Hans Häglund  
Douglas Draper  
Puff Östling  
Marianne Andersson

**La estraro de sveda Sekcio de KELI**

Mats Landfors, prezidanto;  
Agneta Järnlström, sekretariino  
Bengt-Olof Åradsson, kasisto;  
Leif Nordenstorm, anstataŭanto

**La estraro de Eldona Societo Esperanto**

Leif Nordenstorm, prezidanto;  
Joakim Enwall, sekretario;  
Anita Dagmarsdotter, kasisto;  
Andreas Nordström, anstataŭanto;  
Bo Sandelin, anstataŭanto

**La estraro de ILEI-se**

Agneta Emanuelsson, sekciestro,  
Fredrik Olofsson, estrarano;  
Inga Johansson, estrarano;  
Bo Hedberg, estrarano;  
Sten Svenonius, estrarano;  
Ralf Jalming, anstataŭanto;  
Carl Mäsak, anstataŭanto.

**La estraro de SEJU**

Carl Mäsak, prezidanto;  
Magnus Henoch;  
Johan Krig Ölund;  
Robin Rönnlund.



Ekskurso al Dalhalla. Fotis: Ann-Louise Åkerlund



## RONDO LANGLET

Svenska Esperantoförbundet har till Valdemar Langlets ära stiftat Rondo Langlet, ett särskilt sällskap för dem som vill stödja förbundet långsiktigt.

Valdemar Langlet ställde upp för esperantorörelsen både i svåra stunder och när den behövde skicklig ledning.

Valdemar Langlet (1872–1960) räknas till veteranerna i Esperantorörelsen. Han var från 1906 ordförande i Svenska Esperantoförbundet, men redan som 19-åring var han med och bildade världens andra esperantoförening, i Uppsala, som han var ordförande för från 1892 till 1899.

Under denna tid grundade han och redigerade tidskriften *Lingvo Internacia*, den andra tidningen i världen på esperanto, och den enda som kom ut just då.

Den som anmäler sig som medlem i Rondo Langlet ger sin bank eller postgirot uppdraget att sätta en summa på Svenska Esperantoförbundets konto i JAK Banken en gång i månaden via s.k. autogiro. Vi har gjort i ordning en särskild blankett som behöver fyllas i och skickas till SEF. Blanketten skickas till dig om du skriver till undertecknad.

Ett alternativ är att betala in hela årsbeloppet 1200 kr till pg 20 12-3. Som tack är man då medlem i SEF ett helt år.

Summan man betalar till SEF är förstas frivillig, från en hundralapp till – ja, nästan vad som helst. Varje krona kommer att användas för att främja esperanto: Pengarna bidrar till att ge ut *La Espero*, driva en livaktig sajt på Internet, delta i mässor och konferenser, lämna information till nyfikna och för att betala hyran för Esperanto-Centro i Stockholm, en nog så viktig pusselbit.

Vill du bli med ring Kaisa Hansen: 08-590 88 210 eller e-posta: [kaihan@bredband.net](mailto:kaihan@bredband.net)

Wim Posthuma

### *Daŭrigo de "La kolektantoj" dekstre sur tiu ĉi paĝo:*

komencis traserĉi la publikajn rubujojn por trovi revendeblajn botelojn kaj skatolojn. Li bone komprenis ke li devos trovi multajn, ege multajn, por ricevi sufiĉe da mono por povi aĉeti tion, kion li volas, sed li tamen volis klopodi... Matene, la promenantaj homoj nur vidas ke ĉie sur la razenoj kuŝas rubaĵoj, ĵetitaj de iu, kiu traserĉis la rubujojn. Terure!

Kirasulo

## La kolektantoj

Kolekti revendeblajn botelojn kaj ladskatolojn estas aventuro. Malplena skatolo donas 50 oerojn, kaj malplena plasta botelo donas unu, du aŭ eĉ kvar kronojn, depende de modelo. Ekzistas ankaŭ vitraj boteletoj, kiuj donas sesdek oerojn.

La plej fervora kolektanto de nia urbo estas H.N., pensiulo, fraŭlo loganta en unuĉambra apartamento. Ŝajnas ke neniu homo en la urbo scias pri kio li laboris. Nun li tamen estas pensiulo kaj laboras plentempe – almenaŭ kelkhore ĉiutage – pri kolektado de skatoloj kaj boteloj. Li estas konata en la parto de la urbo kie li kolektas, ĉar li ĉiam promenas portante du plastajn sakojn, kiujn li dum kelkaj horoj plenigas per boteloj kaj skatoloj. Malofte oni vidas lin traserĉi la publikajn rubujojn. Se oni demandas lin pri kie li trovas tiom da boteloj kaj skatoloj, li diras ke li havas siajn sekretajn ejojn. Pli precizan respondon li neniam donis kaj ne donos.

Li tamen volonte rakontas ke en varma somero abundas trinkaĵskatoloj pli ol en malvarma vintro.

"Kiom vi perlaboras?"

"Kelkmil kronojn ĉiumonate?" Kion li faras per sia mono, ne necesas demandi. H.N. estas eterna gasto en burgerejo kaj foje en kafejo. Lia vestaĵaro estas malnova kaj modesta. Nur malmultaj homoj komencas diskuti kun li, sed tiuj kiuj faras ne malkontentiĝos, sed rimarkos ke H.N. estas erudicia homo, kiu bonege regas kaj filozofion kaj multajn lingvojn. Se li edukiĝos, li povus esti heroĝinta en universitato. Nun li estas heroo de la kvartalaj knaboj.

Inter la knaboj elstaras I.O., ku estas vivema kaj ĉarma knabo, kiu ĉiam volas partopreni kiam okazas io interesa, ne gravas kio. Komprenoble li ne volas maltrafi la ŝancon kolekti botelojn kaj skatolojn laŭ la ekzemplo de la granda heroo H.N. Kune kun siaj amikoj li komencis kaŝe sekvi H.N. por eltrovi la sekretajn ejojn. Planite kaj farite. Tute ne estis malfacile trovi la ejojn. Simple neniu antaŭe klopidis fari tion. Montriĝis ke la sekreta ejo estas rubaĵkontenero, en kiun kelkaj picejoj lasas plastajn sakegojn plenplenajn kun skatoloj miksitaj kun aliaj rubaĵoj. Tio ĉi okazas ĉefe pro tio ke neniu dungito volas uzi sian tempon por perlabori kelkajn kromajn kronojn. Oni tamen ne kreu ke la knabaro tuj rabis la sekretan ejon de H.N. Tute ne. Ili

plenkore respektis la sekreton de la heroo, ĉar montriĝis ke la "sekretaj ejoj" estus nur unu. En la cetera urbo la knabaro komencis pli kaj pli intense kolekti botelojn kaj skatolojn. Samtempe H.N. maljuniĝis kaj tute ne havis fortojn plu kolekti. Tiam la knabaro komencis rasti la konteneron, sed post dujara atendado pri la sekreta ejo la plej multaj knaboj jam fariĝis tiel grandaj, ke ili ne plu volis rasti en naŭza kontenero, ĉar tio estas "infaneca". Restis do nur I.O., kiu tute fajfis pri la opinio ke kolektado estas infaneca. I.O. riĉiĝis pli ol iu alia knabo en la urbo, sed pri tio li ne rakontis al aliaj, ĉar li fakte estis kontenta ke nur li inter la knaboj daŭre kolektadis.

El la urbo tamen ekzistis ankaŭ alia kolektanto. Tio estis sinjorino T.G. Eble vi ne povas imagi ke la plej riĉa homo de la urbo kolektas skatolojn kaj botelojn. Klopodu imagi ke vi vidas ŝin en eleganta sed ne kiĉa robo promenantan sur unu el la pavimoj. Subite ŝi vidas malplanan platan botelon sur la strato. "Ho, kiel bone! Nun mi ne devas aĉeti botelon kiam mi mikso fruktosukon por kunporti al ekskurso." T.G. tute sincere diras tion ĉi. Ne estas por teatri aŭ por ŝajnigi ŝparemon aŭ malriĉecon. Estas simple ĉar ŝi kontentas pri la trovita botelo.

Alia kolektanto de boteloj estas G.M. Li estas rifuĝinto el fora lando, kiu provizore restas en la lando por atendi decidon ĉu li rajtos resti aŭ ne. En la komenco liaj provoj kolekti botelojn estis vanaj. Kun grandega plasta sako plena de preskaŭ nur senvaloraj keĵ neredoneblaj boteloj, lasitaj de aliaj kolektantoj li alvenis al magazeno, kies maŝinoj rifuzis akcepti ilin. Post tio li pli bone lernis kiujn botelojn oni povas redoni. La monon, kiun li perlaboras per la kolektado, li sendas al parenco en la hejmlando, kiuj uzas parton por siaj propraj elspezoj, kaj alian parton por politika agado kontraŭ la tiea registaro.

Ankoraŭ unu kolektanto estas M.G. Neniu vere scias ke li kolektis botelojn kaj skatolojn. Estis konata afero ke li estis alkoholisto kaj narkotisto. Dum jaroj li vivis sen labori, kaj homoj ne sciis de kie venas la mono, por kiu li aĉetas siajn alkoholon kaj narkoton. Fakte li iam laboris kaj iam ŝtelis. Iun malvarman aŭtunan tagon lia narkotemo estis tiel granda ke li eĉ *Daŭrigo maldekstre sur tiu ĉi paĝo.*



## Ferenc Szilágyi

Ferenc Szilágyi naskiĝis la 1-an de februaro 1895 en Budapeŝto. Doktoro pri juro, advokato, oficisto, verkisto, redaktoro, Esperanto-instruisto. Akademiano. Li fariĝis esperantisto en 1924. Dum longa tempo li estis senlabora kaj pro tio havis tempon profunde lerni Esperanton. Li organizis altnivelajm literaturajn vesperojn kaj konstante gvidis kursojn. En 1932 li komencis instrui laŭ la memverkita lumbildmetodo kaj de la sama tempo gvidis sukcesajn kursojn en Svedlando; dum unu jaro okazis 20 kursoj kun ĉirkaŭ 500 kursanoj, kaj 32 prelegoj plejparte pri Hungarujo. Li kunlaboris en diversaj hungaraj gazetoj. Gvidis Esperanto-kursojn kaj aranĝis literaturajn vesperojn. De 1932 praktikis propran lumbildan instrumentodon, precipe en sia nova loĝlando Svedio. Li mortis la 1-an de decembro 1967.



Li estis kunlaboranto de "Hungara Heroldo" kaj aliaj gazetoj. Redaktoro de "Literatura Mondo", ĉefredaktoro de la skandinava literatura revuo "Norda Prismo". Li redaktis ankaŭ kvin "Rapsodiojn" (kolektojn de prozo kaj poezio, originala kaj tradukita 1943-1953. Kunlaboris al *Hungara Antologio* (1933), *Enciklopedio de Esperanto* (1933-34), *Sveda Antologio* (1934). Kunredaktis 33 *rakontoj*, Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA.

Lia novmetoda gramatiko aperis en 1935. Li estis ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio de Esperanto.

Szilágyi ankaŭ kontribuis al la esperantlingva poemantologio *Dekdu Poetoj* aperinta en 1934 ĉe la eldonejo Literatura Mondo sub redakto de Kálmán Kalocsay, kiu komentas Kurzens kaj lian poezion tiel:

La freneziginta mondo, la postmilita kaoso, la senespereco de l' baraktanta homaro stertoras en multaj poemoj de Szilágyi per ŝiritaj akordoj, aŭdacaj moduloj, ofte per penetraj disonancoj. Jam tie ĉi montriĝas lia tendenco simbolisma kies plej sukcesa frukto estas "La Tasko". En ĝi la sento de senpovo per helpo kaŝas sin sub groteska

ŝerco, tra kiu, tamen, eĉ pli potence tratondras la malespera danĝersonorilo; la fina grimaco estas kvazaŭ dolore cinika vangofrapo. Ankaŭ en sia memliriko li havas emon al simboloj: tiuj poemoj montras senhelpan vaganton de vivo, senespere ĉirkaŭrigardantan en embarasa kirlo-mikso. Eble, malofte, iom sentiĝas kelka manko de senpereco. Sed tio ja ne koncernas lian "Vivraporton", ĉi tiun freŝvoĉan, sincere varman vivkonfeson, en kiu la telegrama lakoneco tiel ĉarme subpenras per bohema rezignacio ĝuste la plej korŝirajn plendojn. La atako de Nekrasov kontraŭ la recenzisto Szilágyi estis vere bonvena, ke ĝi instigis por la elkanto de tiu ĉi poemo.

### Originalaj verkoj:

- \* Trans la Fabeloceano, modernaj fabeloj kaj poemoj (1932),
- \* La granda Aventuro,



(Ankoraŭ havebla ĉe Eldona Societo Esperanto.)

- \* Koko krias jam, novelaro (1955),
- \* Tiel okazis, aŭ Mistero Minora, psikologia kriminala romano.
- \* Sveda Novelaro,
- kolekto Rapsodioj, prozo kaj poezio.

### Tradukoj:

- \* Poemaro el Hungarlando (1929),
- \* Pentroarto en Malnova Hungarujo, riĉe ilustrita verko de Genthon (1932),
- \* Mi serĉis oron kaj oleon, sed trovis... de Flood,
- \* Ni en Skandinavio, humura verko de Breinholst.

### Lernolibroj:

- \* La simpla Esperanto, lernolibro (1932),
  - \* Ellernu, daŭriga lernolibro.
- Laŭ [Vikipedio](http://www.esperanto.net/literaturo) kaj [www.esperanto.net/literaturo](http://www.esperanto.net/literaturo)

## Barbro Haraldsson

Barbro Haraldsson mortis la 22-an de marto, 88-jara. Ŝi estis ege vigla homo kaj esperantisto, kiu tre ŝatis vojaĝi kaj ĉiam aktive partoprenis nian kluban agadon. Ŝi gvidis kursojn kaj distris nin dum niaj renkontiĝoj per diversaj ludoj kaj lerte elpensitaj artifaĵoj.

Krome ŝi ofte kaptis la okazon informi pri esperanto, ekzemple per leteroj al redaktoroj de diversaj gazetoj, per proponoj pri demandoj por konkursoj kiel Jeopardy, same kiel per ofertoj pri kursoj al kolegoj instruistoj kaj aliaj.

Ni neniam forgesos niajn diskut-vesperojn ĉirkaŭ la kuireja tablo de Barbro, kiam ŝi regaligis nin per delikataj sandviĉoj kaj amuzaj rakontoj el sia longa kaj interesa vivo. Povus temi pri la vojaĝo al Usono kaj Havajo en la junaĝo, pri la laboro kiel gastfilino (*au pair*) en Francio aŭ kiel stevardino en longdistancaj aŭtobusoj sur la eŭropa kontinento, pri travivaĵoj kiel posedanto de kaprica aŭtomobilo kune kun amikino en Gotenburgo aŭ pri partopreno en diversaj esperantoaranĝoj kaj kongresoj. Eble la plej grava el tiuj lastaj estis la UK en Pekino en 1986.

Barbro postlasas grandan breĉon en nia vico. Ni memoros ŝin kun ĝojo kaj dankemo.

Ann-Louise Åkerlund  
Klubo Esperantista de Helsingborgo

## Josef Zitka

Josef Zitka fidiĝis den 18 april 1929 i Tjeckoslovakien. och avled den 23 april i Värnamo. I Tjeckien lärde sig Josef tyska, engelska, ryska och esperanto. Då Soviet gick in med trupper i Tjeckoslovakien 1956, flydde Josef med sin familj till Sverige. Erik Carlén hjälpte dem att få bostad och att bli svenska medborgare. Anna Alamo hjälpte dem sedan att få lämpligt arbete. I Värnamo har Josef tjänstgjort på Värnamo sjukhus som laboratorie-assistent.

De sista fem åren har Josef lidit av cancer och vid 80 års ålder blev han intervjuad av Värnamo Nyheter. Efter en vecka avled han i sitt hem.

Efter begravningstjänsten, som ägde rum i Smyrnakyrkan hälsade jag från Kristna Esperantoförbundet och Svenska Esperantoförbundet.

Arne Lundkvist



## Raporto de Lund

La Esperanto-klubo de Lund raportas ke ĝi kunvenis naŭfoje dum 2008. El la programo ni povas mencii legado el la libro "Blanko sur Nigro" de Rubén Gallego kaj kantado de Anna Burenus kaj akordiona ludado de Kim Henriksson. En la kristnaska kunveno partoprenis 19 personoj.

La klubo membras en la UN-asocio de Lund. Ĝi abonas Literaturan Foiron kaj lasas ĝin en la urba biblioteko.

## ...kaj de Väsby

La Esperantoklubo de Väsby dum la jaro 2008 komencis eldoni la informilon Kulturforum Esperanto, kiun oni dissendas pere de interreto. La klubo havas 15 membrojn.

## Gotenburchanoj pli videblos en kafejoj

Ni legas en Inter-libilo, la revuo de la Esperanto-societo de Gotenburgo:

"La kapitalo de la klubo rapide forfluas pro la kosto de nia klubejo, kiun malmultaj membroj nuntempe frekventas. La estraro pensas ke ni jam nun nuligu la kontrakton de la klubejo kaj uzos la monon pli bone. Renkontigojn ni povas havi en por la okazoj luitaj lokaloj, pli malgrandajn renkontigojn en la kafejo Språkcaféet, kaj tiel ni ankaŭ estos pli videblaj inter homoj. Esperanto-librojn oni povas pli volonte prunti en la Urba biblioteko, k.t.p."

## 449 membroj

Ni legas en la jarraporto de Sveda Esperanto-Federacio:

**Membraro de SEF**

Je la fino de 2008 la membronombro estis 459. Kaisa Hansen prizorgis la membro-registradon kaj dissendadon de leteroj al membroj kaj kluboj.

**Informado**

La informado ankaŭ ĉi-jare abundis en Svedio, helpe de pluraj lokaj agantoj. La plej grandaj informaj agadoj okazis aŭtune.

**Esperanto-Centro**

La EC estas bezonata kiel "fenestro al la mondo" de la sveda esperantomovado. Granda kvanto da membroj-subtenantoj, per membreco en Rondo Langlet, donas la ekonomian forton por ke SEF povu havi libroservon kaj kunvenejon en la centro de la ĉefurbo. La estraro profunde dankas kaj al la personoj kiuj surloke zorgas pri EC kaj al la sinoferaĵaj membroj. Ĉiuj estas bonvenaj eniri la Rondon Langlet.

EC estas plejofte malfermita dum kelkaj horoj merkrede posttagmeze. Pri tiuj deĵorhoroj respondecas ĉefe Ulla Luin. Parte dum tiu tempo i ankaŭ prizorgas la libroservon. EC "apartenas al ĉiuj membroj", do se vi estos en Stokholmo, prenu kontakton kaj ni provos malfermi EC.

Telefonvokoj, kiam neniu troviĝas en Esperanto-Centro, estas redirektataj al la hejmtelfono de Roland Lindblom, kiu de sia hejmo priservas membrojn kaj interesulojn.

## Lingva stafeto

En Sveda nacia scienca kaj teknika muzeo en Stokholmo troviĝas ĉina antikva pentraĵo kun aŭtoro subskribo kaj diversformaj sigeloj. Dum 70 jaroj tamen neniu en la muzeo sukcesis legi la tekstojn. Ĉina scienc-teknikista delegacio en 2007 vizitis la muzeon. Dungitoj en la muzeo petis la delegacion pri tradukhelpo. La delegacion tion ne sukcesis fari surloke. Ĝiaj anoj tamen kunportis fotojn de la pentraĵo kaj transdonis ĝin al la ĉina fakulo Hu Guozhu, kiu kun helpo de pluraj ĉinaj fakuloj sukcesis la tekston el la jaro 1502.

La tekston Hu Guozhu tradukis al Esperanto. La Esperantan tradukon Roland Larsson en Stokholmo tradukis en la svedan. Ankaŭ tiu tradukado estis komplika afero, ĉar fakaj terminoj devas esti profunde komparataj.

Pri la traduka laboro rakontas kvinpaĝa artikolo en la franca "La Gazeto", n-ro 141, marto 2009.

## Esperanto pentekoste

Lennart Svensson ricevis inviton legi biblian tekston en Esperanto en la preĝejo de Rämnen en la pentekosta tago. Ĉar pentekosto temas i.a. pri lingvoj eble estas bona ideo proponi sin mem por bibliolegato en Esperanto en preĝejoj venontjare.

## La milionulo

Baniko alvenas ĉe Kruko: Kruk', mi estas sen groŝo en poŝo; ĉu vi povus pruntedoni al mi kelke da?

Kruko: Senprobleme, uleto! Jen kelkaj centmiloj.

Kaj li ĵetas al Baniko tutajn manplenojn da monbiletoj.

Baniko estas mirfrapita: Kiel...?

Kruko: Hieraŭ vespere ni ludis Monopolon. Mi gajnis milionojn!

## Vidu lin ebria

Jozefino babilas kun maljuna najbarino, s-ino Nazeg.

S-ino Nazeg: Mia patrino ofte diris, "Ne edziniĝu kun viro antaŭ ol vi vidis lin ebria!"

Jozefino: Kaj ĉu vi sekvis ŝian konsilon?

S-ino Nazeg: Ne, Jonjo, mi ne povis.

Jozefino: ??

S-ino Nazeg: Mi estis edzino jam naŭ jarojn antaŭ ol mi komprenis ke mi neniam vidis lin malebria!

## Ne tro rapidu!

D-ro Klister ekzamenas Krukon: Mi estas malkontenta pri via pezo.

Kruko: He, ja, mi supozas ke ĝi ja iom pliigiĝis....

D-ro Klister: Ĉu vi regule ekzercas vin per la rultapiŝo, kiel mi sugestis?

Kruko: Jes ja. Mi uzas la rultapiŝon ĉiutage dum tridek minutoj.

D-ro Klister: Nu, tio ŝajne ne havas multan efikon. Je kiu rapido vi regulis la rultapiŝon?

Kruko: Je kvarcent metroj hore.

D-ro Klister: Sed tio estas multe tro malrapide!

Kruko: Sed se mi pliigus la rapid-econ, mia biero superverŝiĝus....

## Pigra aŭ eĉ pigrega

Li estas tiom pigra ke ĉiutage vekigi kiel eble plej frue por havi pli da tempo por nenionfarado.

## Inteligenta pruvo

Amando plendas: Panjo, mia koramiko diras ke mi ne estas sufiĉe inteligenta por li.

Jozefino: Ĉu?

Amando: Kion mi povus fari por prui ke mi ja estas inteligenta?

Jozefino: Facile - forlasu lin!

## Maldikiĝi

-Doktoro, mi bezonas efikan kuracilon por maldikiĝi.

-Nenia problemo! Mi preskribu karbon por vi.

-Ĉu forme de pulvoro aŭ de tablojdoj?

-De sakoj. Vi iru malŝarĝi vagonojn kun karbo.



Nova  
Koresponda  
Servo -  
kun fotoj!  
Ekfunkciis nova  
internacia  
esperantista  
koresponda servo  
kun la nomo  
"Koresponda Servo  
Universala, KSU".  
La Servon iniciatis  
Viktor Kudrjavcev,  
redaktoro de la  
revuo  
"Komencanto". La  
servo facilas por  
uzo kaj preska iuj  
korespondanoncoj  
kunhavas fotojn!  
Adreso de la servo:  
[http://esperanto-  
plus.ru/koresponda-  
servo/](http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/)  
Estimataj  
samideanoj,  
bonvolu uzi la  
Servon mem kaj  
rekomendi in al  
viaj konatoj,  
instruistoj,  
kursgvidantoj,  
redaktoroj,  
abonantoj,  
komencantoj...  
Krom plumamikaj  
"Koresponda Servo  
Universala"  
akceptas anka  
alispecajn  
anoncojn kaj  
informojn!  
Viktor Kudrjavcev  
[http://esperanto-  
plus.ru/koresponda-  
servo/](http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/)  
[esperantoplus@  
ail.ru](mailto:esperantoplus@ail.ru)

## TRA LA MONDO

### Popol- nombrado

Popolnombradoj donas indikon pri la kvanto de esperantistoj.

Ĉu 200.000 aŭ 2 milionoj da parolantoj de Esperanto? Aŭ kiom? Dum longa tempo oni povis nur malfacile kaj kun granda necerteco respondi al tiu ĉi demando. Sed antaŭ kelkaj jaroj okazis popolnombradoj en Litovio kaj Hungario, ĉe kiuj oni demandis ankaŭ pri la kono de fremdaj lingvoj. Se oni surbaze de la rezultoj faras takson por la tuta Eŭropa Unio, oni venas al proksimume 80.000 ĝis 150.000 personoj en EU, kiuj parolas Esperanton. Por la tuta mondo rezultas la duoblo, ĉ. 160.000 ĝis 300.000 Esperanto-parolantoj, asertas Lu Wunsch-Rolshoven.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

### Pri literatura verko

En 2008 aperis monumenta verko de Geoffrey Sutton pri la literaturo de Esperanto. Ĝi estas la ĝis nun plej ampleksa monografio pri la vasta temo, kaj iom mirinde, ĝi estas anglalingva. Kelkaj esperantistoj jam proponis, ke oni traduku la verkon "Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto" al Esperanto, sed kompreneble la anglalingva versio povas atingi multe pli grandan publikon, kiu ĝis nun tute ne konsciis pri la ekzisto de esperantlingva literaturo. Plian paŝon direkte al sia potenciala publiko la elstara verko faris la 6-an de februaro, kiam en la pinte prestiĝa literatura revuo Times Literary Supplement aperis ampleksa recenzo de John Wells.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

### Reta filmĵurnalo

La 15-an de majo 1998 estis dissendita la unua numero de Gazetaraj Komunikoj de UEA. Precize 11 jarojn poste la populara novaĵservo ricevis aŭdvidan kunulon, kiu nomiĝas UEA viva. Temas pri 10-minuta filmĵurnalo en

YouTube kun mallongaj raportetoj pri aktualaĵoj en la vivo de UEA kaj TEJO kaj de la Centra Oficejo. Ĉiufoje oni prezentas ankaŭ novaĵojn en la Libroservo. Komence oni planas prepari UEA viva kun intervaloj de unu-du semajnoj. Gazetaraj Komunikoj plu aperos kiel antaŭe.

La lanĉo de la reta ĵurnalo UEA viva estas nova paŝo en la plivastiĝanta utiligo de modernaj komunikrimedoj en la agado de UEA, kiun antaŭvidis la Strategia Laborplano de la Asocio. Komence de majo UEA funkciigis retan kinejon en Ipernity, kie jam estas videblaj ok filmoj pri la programeroj de la aprila Malferma Tago kaj du historiaj dokumentoj pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959. Iom post iom la kolekto de la reta kinejo estos plivastigata per aliaj filmoj.

La ĵurnalo UEA viva troviĝas en: <http://www.youtube.com/UEAviva>  
La reta kinejo troviĝas en <http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

### Lingva festivalo en Nankino

Sabate la 18-an de marto jam la duan fojon en la urbo Nankino en Ĉinio okazis Lingva Festivalo, sed ĉi-foje anstataŭ granda festivalo, en kiu estis multe da lingvoj, kursetoj kaj partoprenantoj, estis starigita malgranda festivaĵo en kiu prezentigis nur 9 lingvoj kaj 27 kursetoj, kiel eksperimento. Inter la instruataj lingvoj estis ankaŭ la angla kaj la germana, sed pli popularaj ol tiuj estis la japana kaj Esperanto.

La kursoj, kiel dum tradicia Lingva Festivalo, daŭris nur 40 minutojn, kaj konsistis el pluraj partetoj, en kiuj la instruantoj prezentis iomete pri la historio de la lingvo, iomete pri prononcado, iom da gramatikaj kaj utilaj frazoj kiel "Mi amas vin!" Ĉe la lasta parto de la leciono iu instruanto lasis kelkajn minutojn por demandoj de la ĉeestantaro.

La nombro de la ĉeestantoj por la kursetoj estis jena: la angla 113, araba 73, esperanta 126, franca 147, germana 101, hispana 52, itala 105, japana 153, kaj korea 141. Entute, 1011.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)



### Anemona renkontiĝo

Dum la Sveda Esperanto-kongreso okazis ankaŭ Anemona renkontiĝo de SEJU.



La kongreso estis tute plenplenaj da longaj kunsidoj, samtempe kiel ni anemonoj trankvilumis kaj simple ĝuis la bonan etozon. Tamen, krom la longaj kunsidoj estis bonaj arangoj kiel la prelegoj de Paul Gubbins kaj sabata vespermanĝo konsistanta el struto kaj kun viva muziko kaj dancado. Do, la kombino SEF-kongreso kaj Anemona Renkontiĝo estis tre bona kaj ni certe daŭrigos tion.

Johan

### Sommarkurser

Esperanto: grundkurs  
Esperanto: att skriba filmmanus

Tid: 20 – 24 juli 2009

Pris: 2800 kr. Priset omfattar kurs, kost och logi på folkhögskolan.

Tid: 20 – 24 juli 2009

Pris: 2800 kr. Priset omfattar kurs, kost och logi på folkhögskolan.

Läs mer om Visingsö på [www.visingso.net](http://www.visingso.net)

Anmälan och information:  
<http://www.folkuniversitetet.se/templates/ort.aspx?id=2411>

Språkkurser på olika nivåer på EsperantoGården

Årets sommarkurs på Esperanto-Gården inträffar från söndag 12 juli till söndag 19 juli 2009 i Lesjöfors, Värmland. Kursutbud, schema och priser, se <http://e-g.se/> eller ring 0590-309 09.



## "Krokodili" och annan esperantoslang

Begreppet *krokodili*, 'att krokodila', är ett esperantouttryck som innebär att två eller flera personer med samma modersmål talar detta sinsemellan i esperantosammanhang. *Reptiliumi*, 'att reptila', är ett kanske inte så ofta använt samlingsnamn för detta och några andra närliggande företeelser: *aligatori*, *kajmani*, *lacerti* och *gaviali*. *Aligatori* innebär att man samtalar på ett språk som är modersmål för en eller några några – men inte alla – samtalsdeltagare i ett esperantosammanhang. I kontrast till detta står *kajmani*, som innebär att man samtalar på ett annat språk än esperanto, men som inte är någon av samtalsdeltagarnas modersmål.

Som något av ett mellanting finns *lacerti*, 'att ödla', som enligt Wikipedia verkar ha två innebörder:

den främsta att man i ett esperantosammanhang använder ett annat planspråk än esperanto (till exempel interlingua), men också en alternativ innebörd, att man samtalar på olika språk men som är ömsesidigt begripliga för deltagarna, till exempel svenska och norska.

Slutligen finns *gaviali* (eller ibland *malkrokodili*, 'o-krokodila'), som i någon mån utgör en motsats till de tre första, nämligen att använda esperanto i ett sammanhang där något annat språk skulle vara bättre lämpat, till exempel att samtala på esperanto i en grupp enbart bestående av svenskar, eller då samtalsdeltagare som inte förstår esperanto närvarar. Att samtala på esperanto svenskar emellan är ju dock något som rimligtvis förekommer rätt ofta vid klubbaktiviteter och träffar, och fyller en viktig funktion: att öva sina kunskaper i esperanto!

Olof Pettersson



Äntligen i ny upplaga:



Esperanto! Nyckel till det internationella språket har kommit i en ny upplaga. 15 x 10,5 cm. 48 s. Beställ flera till klubben eller för att ge bort till julklapp, 2 ex, 40 kr; 5 ex, 100 kr; 12 ex, 220 kr; 25 ex, 375 kr; 50 ex, 600 kr; 150 ex, 1200 kr.

Dessa priser inkl. porto.

Esperantoförlaget, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg, [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com), 031 - 12 05 94  
Information om andra böcker :  
[www.algonet.se/~eldona](http://www.algonet.se/~eldona)

## Kiel traduki "gubbe"

*Tradukado estas malfacila, negrave ĉu temas pri traduko al Esperanto aŭ al iu alia lingvo. Oni ĉiam devas difini la veran signifon de la vorto aŭ esprimo, kiun oni volas traduki. Jen artikoleto, kiu iom priskribas tradukproblemoj kiam oni uzas la svedan vorton "gubbe",*

Ĝus mi intencis traduki la svedan vorton "gubbe" kaj kompreneble konsultis la libron "Ordbok Esperanto – Svenska" de Ebbe Vilborg. Jen, kion la vortaro proponas.

Gubbe:

1. maljunulo, oldulo, granda ulo gubben A ; la maljuna A (skämts.) min gubbe lilla; amiko mia
2. (bild.); figuro gubbe eller pil; fronto aŭ dorso gubben i lådan; saltopupo
3. (tabbe); miso
4. den gubben går intel; tio ne efikas al mi!

för hundra gubbar!; pro iuj sanktuloj!

Propono numero 1. ja estas la plej ofta signifo de la vorto. En la sveda libro "Petsson och Findus" oni referencas al "Petsson" kiel "La maljunulo Petsson" (Gubben Petsson). La traduko de "min gubbe lilla" (amiko mia), kiu estas indikita kiel (skämts.) "ŝerca", ne sonas en miaj oreloj ŝerca kiam mi diras tion en Esperanto.

Mi certe elektus alian tradukon. Eble "mia kara bubo" pli trafas en certaj situacioj. Laŭ mi ankaŭ eblas uzi la vortojn "ulo", "majulo" aŭ "maljuna ulo". Tamen "majulo" povas esti perceptata kiel kunskribo de "maja ulo", kiu probable celas ulo kiu festas sian datrevenon iam dum la monato majo :-)

Unu el la klarigoj pri la deveno de la vorto "gubbe" estas, ke temas pri aliformiĝo de "god bonde" (bona agrokulturisto).

La dua signifo de la sveda vorto "gubbe" estas "figuro". La sveda "rita en gubbe" mi tradukas per "desegni fantazian ulon" kiu la mi estas sufiĉe trafa en Esperanto.

La esperanta vorto "figuro" inter alie celas al videblaj eksteraj formoj de iu estaĵo. Ja eblas elĉizi formojn el lignopeco tiel, ke la formoj indikas, ke temas pri viro.

Se mi svedlingve diras "jag gjorde en gubbe" kaj tradukas tion per "mi faris figuron / ulon" oni probable ne perceptos, ke mi faris eraron aŭ mison. Vidu la traduko ĉe numero 3 en la listo el la "Sveda – Esperanto vortaro de Ebbe Vilborg.

La sveda esprimo "Den gubben går inte" povas esti tradukata per: "Tiu viro ne paŝas." Tio ja estas vera, se la viro ne moviĝas sed staras senmove. La tradukpropono en "Sveda – Esperanto ordbok" eble bezonas kompletigan vorton, nome "truko" "tiu truko ne efikas al mi" ĉar esence la esprimo signifas, ke oni malkaŝis trompoprovon.

Anonimulo

